

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2017

Ĵaŭdon la 30an de marto

65a jaro

Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardon la 4an de aprilo (semajno 14) – *tirsdag*

Kiel rilati kun malriĉaj afrikanoj? Spertoj pri retroŝta (kaj retbanka!) kontaktado kun E-aktivuloj kaj -grupoj.

Hvordan forholde seg til fattige afrikanere? Erfaringer fra e-post- (og bank-) kontakt med E-grupper og -enkeltaktivister i Afrika.

Mardon la 2an de majo (semajno 18) – *tirsdag*

Studkunveno; tradukado de kajero pri malnovaj metioj. Daŭrigo de la laboro 20. marto.

Studiemøte: oversettelse av hefte om tradisjonelle håndverksyrker.. Fortsettelse av arbeidet 20. mars.

Lundon la 15an de majo (semajno 20) – *mandag*

La strategiplano de NEL kaj aliaj temoj traktotaj de la landa kunveno.

Forbundets strategiplan og andre temaer som skal opp på generalforsamlingen

Mardon la 6an de junio (semajno 23) – *tirsdag*

Resumo de la landa kongreso. Novaj planoj por la klubo kaj la Ligo.

Oppsummering fra landsmøtet. Fremtidsplaner for klubben og Forbundet

Lundon la 19a de junio (semajno 25) – *mandag*

Studkunveno, kiel 2. majo.

Studiemøte, som 2 mai.

Kaj ni aranĝas kromkunvenojn kiam venas eksterlandaj gastoj.

La Landa Kongreso

Ĉi-jare okazos Landa Kongreso de vendredo la 2a ĝis dimanĉo la 4a de junio (pentekosto), en Sandnes. Detaloj en *Norvega Esperantisto* n-ro 1.

Landsmøtet: fredag 2. – søndag 4. juni (pinse) i Sandnes..

OKAZIS

La movado en Pollando (16.1)

Asbjørn kaj Kjell Peder vizitis plurfoje Pollandon kaj helpis mal-krokodiligi klubajn kunvenojn. La kluba medio en Lodzo ŝajnas simili al tiu ĉe ni antaŭ tridek jaroj. Ili kunvenas en kultura domo centre en la urbo. Same kiel ĉe ni, mankas junuloj. Ni havas impreson de disa agado en pluraj urboj tra la jaroj, sed malfortas tutlanda kunordigado. Tamen Kjell Peder povis montri jarkolekton 2016 de ampleksa *Pola Esperantisto*.

Tradukado: *Malnovaj metioj* (7.2)

Ankoraŭ unu tre instrudona kun-

veno pri traduka tasko *Malnovaj metioj*. Pluraj tiel forte engaĝiĝis en la diskuto ke malfruis la manĝopaŭzo kaj restis nur la veteranoj por interparoli pri afrika klubo k.s.

Por novuloj (20.2)

Ni invitis lernantojn ĉe lernu.net kaj aliajn interesiĝantojn al informkunveno. Venis tri novuloj, al kiuj ni prezentis la aktualan agadon de la klubo kaj de la cetera E-movado.

Plia traduk-kunveno (20.3)

Ni diskutis tradukon de unu plia paĝo pri *Malnovaj metioj*. Tre efike! Ĉiuj lernis ion novan.

Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

Vizitkartoj

Ankoraŭ restas vizitkartoj kun la adresoj i.a. de la senpagaj E-retkursoj lernu.net kaj (la angla) duolingo.com.



Jarkunveno mardon la 7an de marto 2017

Konciza raporto

Partoprenis 5 (kvin) membroj: La **jarraporto**.

Ni aldone registris en la raporto ke Cato Haugen ĉiĉeronis ĉeĥan gaston en Eidsvoll junio.

Cetere ni faris diversajn redaktajn korektetojn al la versio dissendita retpoŝte fine de februaro. Kun tiuj ŝanĝetoj ni aprobis la raporton.

La **kalkulo** aprobiĝis kun du redaktaj ŝanĝetoj – kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn.

Elektioj

Ni reelektis la jenajn:

Prezidanto: Kjell Peder Hoff

Sekretario: Douglas Draper

Kasisto: Harald Rygg

Anstataŭantoj: Ni reelektis Ellen Dalen kaj elektis Jacob Grevstad.

Revizoro: Terje Meier (reel. kondiĉe ke li akceptos)

Kluba reprezentanto en la domkomisiono: Ni reelektis Kjell Peder Hoff.

Anstataŭantoj (po unu) por la revizoro kaj la domkomisiono mankas. Elekta komisiono: ne elektita.

DD

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto – kiel ekzemple en la Mela-festivalo (vidu la antaŭan paĝon). Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Eller et lokalbibliotek som er mot-takelig. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

Vi bonvenas viziti nian klubejon

–

en Sinsen ankaŭ kiam ne okazas kunveno.

(vd. vojklarigon malsupre)

Tie vi povas

- legi eksterlandajn E-periodaĵojn
- preni kromekzemplerojn de *Kontakto*, *Heroldo*, *Literatura Foiro*, *Sennaciulo* ...
- legi la grandan artikolon pri Esperanto en *Morgenbladet* (n-ro 8)
- legi la grandan artikolon pri Esperanto en *Aftenpostens Innsikt* (januara)
- prunti bibliotekajn librojn
- aĉeti kromekz. de bibliotekaj libroj (po 20 kr)
- aĉeti glumarkojn (po 2 kr) – aŭ librojn
- babili kaj trinki teon/kafon kaj manĝi zingibrajn biskvitojn

Sed antaŭesploru telefone aŭ retpoŝte, ĉar ne ĉiam iu ĉeestas por malfermi.

Kom gjerne innom, *men send e-post eller ring på forhånd, for det er ikke alltid noen tilstede.*

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen. Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper